

flandra katoliko

Maandblad van het
Katholiek Vlaamsch
Esperanto-Verbond
K. V. E. V.

Monata Organo de
la Flandra Unuiĝo
Katolika Esperantista
F. U. K. E.

Redakcio, interŝanĝservo kaj adreso por alsendo de recenzotaĵoj:
JUSTUS MERKS, Goedendaglaan 109, KORTRIJK (Belgujo). Pĉk. 4898.04.

Abonprezo kun membrekotizoj FUKU kaj IKUE 50 Bfr. Abonprezo por eksterlandanoj: 60 Bfr.
Pĉk. 4123. 54, K.V.E.V. ANTWERPEN (Belgujo).

ALVOKO

al la popoloj de la Mondo

de la KONFERENCO PRI MONDREGISTARO ĈE LA KOLEGIO
ROLLINS okazinta en Winter Park, Florida, Usono (Marto 11-16, 1946)

LA CELOJ DE LA KONFERENCO

La Rollins-Kolegia Konferenco pri Mondregistaro, kies partoprenintoj ekzemplas la plej grandajn variaĵojn de profesioj kaj interesoj, plene kaj harmonie interkonsentis pri la Deklaro kiu sekvas.

Oni nomas ĝin « ALVOKO AL LA POPOLOJ DE LA MONDO », ĉar la Konferenco opinias ke tiu ĉi devas esti, ne Manifesto, sed Alvoko; kaj ke ĝi devas esti

adresata, ne al oficistoj ŝarĝitaj per la plenumo de taskoj jam definitaj al ili, sed al la popoloj ĉie, kiuj

deziras antaŭeniri el la nunaj kondiĉoj de mondanarĥio en mondleĝon kaj ordon.

La Alvoko unue skeletas la fundamentajn interkonsentojn sur kiuj La Konferenco agis en siaj pensadoj. Tiuj ĉi entenas la certecon ke la atoma bombo estas tre multe pligrandiginta la detruemecon de

la milito; la konvinkon ke oni ne povas fidi al la nacioj la suverenan rajton fari militon laŭ siaj propraj kondiĉoj; kaj la konkludon ke nenio krom mondregistaro — konstitucia, federacia registaro — povas konservi la popolojn kaj iliajn liberecojn.

Tiuj ĉi celojn, la Alvoko daŭrigas, la Unuiĝinta Naciaro en sia nuna formo ne

povas atingi, ĉar ĝi estas ligo de suverenaj ŝtatoj kunligitaj per traktato, ne per monda leĝo. Sed ĉar la Kontrak-

Verkita de CARL van DOREN

**Prezidanto
de la Projektanta Komitato**

to de la Unuiĝinta Naciaro provizas por revizoj laŭ bezono, kaj ĉar atoma militado estas farinta tiun bezonon tuja, oni devas per la necesaj revizoj de la Kontrakto sen prokrasto iniciati la konstruajn rimedojn nun postulatajn.

La Rollins-Kolegia Konferenco tial

proponas tion, kion ĝi opinias esti la ĉefaj kaj necesaj celoj de tiaj revizoj. Ĝi lasas al la personoj elektotaj por ellabori ilin la rajton plenumi tiujn celojn per tiaj detalaj metodoj, kiajn ili opinios plej esperdonaj por sukceso. La minimumaj postuloj, la Konferenco opinias, entenas la aliĝon de la Ĝenerala Kunveno de la Unuiĝinta Naciaro en leĝdonantan fakon de mondregistaro respondema al la volo de la popoloj; la aliĝon de la Ĝenerala Konferenco en agan fakon respondecigita administri kaj efektiviĝi la leĝojn donitajn de la Ĝenerala Konferenco; kaj la kreadon de sendependaj tribunaloj havantaj ĵuĝistan rajton kaj la subtenadon de sufiĉaj fortoj policanaj por malebligi aŭ alie superregi la ilojn de amasdetruado. La povoj ne delegitaj al la Ĝenerala Konferenco kompreneble estus rezervitaj al la membraj ŝtatoj.

Fine, la Rollins-Kolegia Konferenco montras ke daŭra kaj respondeca mondregistaro devas stari sur tutmonda programo de edukado inter la popoloj.

DEKLARACIO DE PRINCIPOJ

La atoma bombo kaj aliaj aplikoj de scienco kaj teknologio estas farintaj modernan militadon tiel ruina ke la ekflamo de alia granda milito devas esti evitata.

Atomaj sekretoj ne povas esti kaŝataj pli longe ol kelkajn jarojn, fare de iu ajn nacio aŭ malgranda grupo da nacioj, kaj sufiĉa milita defendo kontraŭ surprizatako kapabla paralizi la landon kaj popolojn atakatajn estas neebla.

Ne povas esti certa garantio ke la paco estos konservata tiel longe kiel iu ajn nacio havas suverenan rajton decidi por si mem aferojn de milito kaj paco.

Se nacioj vivas sub konstanta minaco de milito, ĉiu suverena ŝtato necese igos pli kaj pli multe diktatorece centrigita; tiel forprenante de siaj civitanoj pli kaj pli multe da persona libereco.

Neniu nacia-ŝtato povas hodiaŭ esperi esti sufiĉe forta, sufiĉe suverena, por ŝirmi siajn civitanojn kontraŭ milito. Du fojojn en unu generacio Usono estas devigita eniri militon kiun la popoloj deziris eviti.

La paco ne estas nur la foresto de milito, sed la ĉesto de justeco, de ordo, mallonge, de orda regado.

Mondpaco povas esti kreata kaj konservata sole sub mondleĝo, universala kaj sufiĉe forta por starigi justecon kaj eviti armilan konflikton inter nacioj.

La sola metodo per kiu iu popolo povas certigi sian vivon kaj konservi siajn liberecojn estas krei kun la aliaj popoloj mondregistaron — konstitucian, federacian registaron — al kiu estos delegitaj la povoj necesaj por konservi la ĝeneralan pacon de la mondo, starigitan sur leĝo kaj justeco.

LA ARGUMENTO

La Unuiĝinta Naciaro kiel nun formita estas ligo de suverenaj ŝtatoj. Kiel tio, ĝi ne estas mondŝtato, kaj tial ne povas per leĝo eviti armi-

lan konflikton inter nacioj, kaj starigi justecon kaj sekurecon. Tamen, ĝi estas la plej grava paŝo al mondpaĉo iam ajn farita de la homaro. Ĉar la kontrakto provizas por revizoj, ĉiu peno devas esti farata aliformigi la Unuiĝintan Naciaron en mondŝtaton.

Tiaj celoj, ni scias, ne povas esti atingitaj en unu punkto. La malfacilaĵoj gajni en ĉiu nacio subtenon por mondŝtato estas pligrandigitaj per la diversecoj de kulturoj, registaroj kaj institucioj inter la nacioj.

Sed oni devas fari komencon. Oni devas fari ĝin per iloj haveblaj. Oni devas fari ĝin nun. Oni devas direkti ĝin, unue, al la forigo de la ĉiama timo kaj malfido per kiu atomaj armiloj kaj iloj de simila detrupovo afliktas la homaron. Usono havas la oportunon kaj la devon ekestri en la proponado de tiaj konstruaj rimedoj, kiaj estas necesaj por tiu celo. Pripensante ĉi tiujn konstatitaĵojn, ni faras la sekvantajn proponojn.

LA CELOJ

Ni proponas ke Ĝenerala Konferenco de la Unuiĝinta Naciaro estu konvokata laŭ kondiĉoj en Paragrafo 109 de la Kontrakto, por projekti revizojn por la jenaj celoj.

1. Ke la Unuiĝinta Naciaro estu ŝanĝata de ligo de suverenaj ŝtatoj en registaron kies precizaj povoj devenos de la popoloj de la mondo.

2. Ke la Ĝenerala Kunveno estu restarigita kiel la leĝdonanta fako de la mondregistaro, en kiu la civitanoj de la membraj ŝtatoj estu reprezentataj laŭ justa bazo.

3. Ke la Ĝenerala Konferenco, krom ĝiaj nunaj oficoj, havu la povon:

(a) Reskripti leĝojn por malpermesi aŭ alimaniere kontroli armilojn de amasdetruado, kaj, tiom kiel necese por tiu objekto, reguligi la uzadon de atoma energio.

(b) Reskripti leĝojn provizantajn por tia inspekto, kia estos necesa aŭ taŭga por la efektivigado de la antaŭnomitaj povoj.

(c) Provizi taŭgajn civilajn kaj kriminalajn sankciojn por la leĝoj reskriptitaj laŭ la antaŭnomitaj povoj.

(d) Provizi kaj subteni policanajn fortojn necesajn por la subtenado de la leĝaro.

4. Ke sendependaj tribunaloj estu kreitaj kun ĵuĝpovo en procesoj kaj disputoj okazintaj sub leĝoj reskriptitaj de la Ĝenerala Konferenco, aŭ kiuj entenas problemojn pri la interpreto de la Kontrakto de la Unuiĝinta Naciaro.

5. Ke Deklaro de Rajtoj estu farata por la ŝirmado de personoj tuŝataj de leĝoj donitaj de la Ĝenerala Konferenco.

6. Ke la Ĝenerala Konsilantaro estu restarigita kiel estrara fako de la mondregistaro kun la povo:

(a) Administrati kaj garantii la plenumadon de la leĝoj.

(b) Sub la direkto de la Ĝenerala Konferenco, plenumi siajn nunajn devojn, kiel difinitaj en la Kontrakto.

7. Ke la povoj ne delegitaj al la Ĝenerala Konferenco estu rezervitaj al la membraj ŝtatoj.

LA KONKLUDO

Ni opinias ke tiuj ĉi estas la minimumaj bezonoj necesaj por la kreo de mondregistaro kapabla eviti katastrofon de alia milito en la atoma epoko. La nuna Unuiĝinta-Naciara Kontrakto ne atingas ĉi tiujn minimumajn postulojn.

La starigo de mondregistaro kiu reprezentos la popolojn de la mondo devas esti akompanata de ampleksa programo de amas-edukado kaj libera interŝanĝo de scioj inter ili.

Nur mondregistaro, eĉ en la limigitaj kondiĉoj ĉi tie proponataj, povos venigi tiun pacon, en kiu la popoloj povos maturiĝi al plena respondeco, per kiu ili povos efektiviĝi sian destinon kiel liberaj homoj.

SUBSKRIBINTOJ DE L' ALVOKO

S. K. ALLISON, Prezidanto, Instituto de Atomkernaj Studoj, Universitato de Chicago.

RAY STANNARD BAKER, Oficiala biografisto de Woodrow Wilson.

JOSEPH H. BALL, Usona Senatano el Minnesota.

CHARLES G. BOLTE, Prezidanto, Komitato de Usonaj Veteranoj, Korporacie starigita.

JAMES H. CAREY, Sekretario-Kasisto, Kongreso de Industriaj Organizaĵoj.

WILLIAM O. DOUGLAS, Asociata ĵuĝisto, Ceftribunalo de Usono.

ALBERT EINSTEIN, Teoria Fizikisto, Princeton Universitato.

BROOKS EMENY, Prezidanto, Konsilantaro pri Mondaj Aferoj, Cleveland, Ohio.

ROBERT M. GAYLORD, Prezidanto de la Aga Komitato, Nacia Asocio de Fabrikistoj.

CARL A. HATCH, Usona Senatano el New Mexico.

W. T. HOLLIDAY, Prezidanto, Standard Oil Kompanio de Ohio.

GEORGE C. HOLT, Direktoro, Rollins-Kolegia Konferenco pri Mondregistaro.

HAMILTON HOLT, Prezidanto, Rollins Kolegio.

FRANK A. JUMAN, Rektoro de la Universitato de la Budo, Episkopo de Florida.

CHARLES M. LAFOLLETTE, Usona Kongresano el Indiana.

LOUIS L. MANN, Rabeno, Sinala Kongregacio, Chicago.

ALEXANDER MEIKLEJOHN, Eksprezidanto de Amherst Kolegio; Usona Delegito al la fako pri Edukado, Scienco kaj Kulturo de la Unuiĝinta Naciaro (UNESKO).

OSCAR MEYER (Filo), Boston, Massachusetts.

JOHN R. MOFF, Prezidanto, Monda Ligo de Asocioj Kristanaj de Junaj Viroj.

G. ARHYON OLDHAM, Episkopo de Albany; Ektro, Mondligo por Internacia Amikeco por la Eklezioj.

CLAUDE PEPPER, Usona Senatano el Florida.

J. I. RAHL, Nobela Premito, Atomokerna Fizikisto, Columbia Universitato.

EMERY REVER, Aŭtoro, «La Anatomio de la Paco».

BERNARD J. SHELL, Help-Episkopo, Cef-Eparĥio de Chicago; fondinto de la Katolika Junulara Instituto.

PRESTON SLOSSON, Historiisto, Universitato

de Michigan; Sekretario, Rollins-Kolegia Konferenco pri Mondregistaro.

HENRY DEWOLF SMYTH, Atoma Fizikisto, Princeton Universitato.

RAPLH W. SOCKMAN, Pastro, Krist-Preĝejo, New-York; Prezidanto, Mondpaca Komisiono de la Metodista Eklezio.

RAYMOND SWING, Radia Komentaristo; Prezidanto de la Direkcio, Amerikanoj Unuiĝintaj por Mondregistaro.

CHARLES W. TOBEY, Usona Senatano el New Hampshire.

HAROLD C. UREY, Eltrovinto de peza hidrogeno, Nobela Premito.

CARL VAN DOREN, Aŭtoro, Historiisto.

H. JERRY VOORHIS, Usona Kongresano el California.

OWEN D. YOUNG, Eksprezidanto de la Direkcio, General Electric Kompanio.

REDAKCIA SUBSKRIBAĴO

Ĉi supran Alvokon ni ricevis pere de Edwin L. Clarke, Delegito de IEL, Winter Park, Florida, Usono, kiu aldonas sekvajn klarigojn kaj petojn:

«La idealoj de Esperanto kaj mondpaĉo estas nedisigeblaj. Tial ni estas certaj ke vi trovos interesan kaj gravan la Alvoko al la Popoloj de la Mondo, kiun ni sendas ĉi kune al vi, subskribita de Albert Einstein kaj aliaj famaj viroj.

Estas urĝe dezirate ke tiu ĉi Alvoko venu al la atento de kiel eble plej multe da homoj. Ni petas vin ke vi helpu jene.

1. Represigu ĝin en via Esperanta gazeto.
2. Atentigu ĝin al samideanoj, ĝis la papero estos en ĉifonoj.
3. Traduku ĝin en vian nacian lingvon.
4. Petu ĵurnalojn ke ili represigu ĝin nacilingve.

Tie ĉi en Usono diversaj asocioj publike subtenas la ideon. Ni esperas ke en via lando, ankaŭ, la diligenta kolegaro ekprenos kaj disvastigos la proponon».

Ni opinias la aferon sufiĉe grava por ke ni submetu ĝin al la atento de niaj legantoj. Krome estas gravege ke la uzebleco de nia lingvo por similaj celoj evidentiĝu precipe al la usonanoj. Tial ankaŭ ni petas ekzameni la eblon traduki la Alvokon kaj sendi la tradukon al nacilingvaj ĵurnaloj. Memkompreneble sukcesoj estu raportataj al S-ro Clarke.

— ESPERO KATOLIKA —

Monata Esperanta Revuo —

Oficiala Organo de I.K.U.E.

Abonnementsprijs voor België (tot einde 1946) Fr. 25.— te storten op PC. 421.734 van E. H. A. Beckers, Mechelen a/Maas.

LA BELGA NACIA RADIO-ORGANO

atentigos la nederlandlingvajn regionojn
de Europo pri la internacia helplingvo
ESPERANTO

Grava sukceso : Esperanto en Belga Radio!

Sub tiu titolo « Flandra Esperantisto » aperigis en sia ĉi-jara junio-numero artikolon, kiu ege ĝojigos la propagandistojn de nia lingvo kaj ĉiujn amantojn de paco kaj progreso.

Kiu okazos ?

La artikolo promesas dum la oktobro-monato ĉiusabatajn propagandajn prelegojn kaj ekde sabato, la 2a de novembro, regulajn ĉiusermajnajn lecionojn por komencantoj.

Kompletigaj informoj.

El privataj informoj ni scias ke tiuj prelegoj kaj lecionoj tre verŝajne okazos de la 14a horo ĝis la 14a horo 10 minutoj, kio ebligas auskulti ilin per du ondolongoj: 321,9 m., la flandra ondolongo de la brusela sendstacio, kaj 202,3 m., ondolongo de la regiona sendstacio Kortrijk. Lecionoj por pliprogresintoj estas planataj kaj sekvas se sufiĉe da interesiĝo montriĝos. Gvidos la kursojn Prof. E. Symoens el Bruselo.

Kiuj profitos ?

La skizita aranĝo profitigos ĉiujn nederlandlingvajn simpatiantojn kaj esperantistojn, do ankaŭ la nederlandanojn; kaj espereble la lecionoj por pliprogresintoj estos donataj tiumaniere ke ankaŭ alilingvaj auskultantoj de ili povu profiti.

Grava pliboniĝo.

Iam ja jam estis donataj prelegoj, parte nederlandlingvaj, parte en esperanto, per la nura ondolongo 202,3 m. de la regiona sendstacio Kortrijk. Sed tiuj elsendoj ne estis aŭskulteblaj ekster 50 ĝis 80 kilometrojn larĝa cirklo ĉirkaŭ la tiustacia sendilo kiu troviĝas en la okcident-flandra vilaĝo Vichte.

Pionira laboro. Vanaj klopodoj ?

Tiujn prelegojn prizorgis nia ĉefredaktoro, S-ro Justus Merks, reĝisoro de l'nomita regiona stacio. Li komencis prelegi la 22-an de aprilo 1945a, do sufiĉe frue post la liberigo de la regiono, kaj eĉ kelkajn semajnojn antaŭ la militfino en Europo! Li povis daŭrigi la prelegojn ĝis la 28a de decembro 1945a. Tiam ĉi tiu *poresperanta* kroniko estis ĉesigita pro motivoj de necesa diversigado de la programoj. Efektive, *poresperantaj* elsendoj ne bezonas regiona sendstacio, kaj *poresperantaj* elsendoj oni ne povas daŭrigi senfine.

Radiaj rondoj ekinteresiĝis.

Sed en radiaj rondoj la intereso estis vekita. Bruselaj samideanoj ne ĉesis atentigi ilin pri nia lingvo. La « Libera Radio Tribuno » de la Belga Nacia Radio Organo enketis pri la demando: « Kion vi opinias pri la neceso de lingvo internacia? » Sin deklaris favoraj al internacia helplingvo 87,50 % de la partoprenintoj, kontraŭaj 12,50 %-oj. La favorajn opiniojn ni povas plue subdividi en 51,25 % por Esperanto, 27,50 % sen prefero iulingva, 6,87 % por la angla, 1,25 % por la latina kaj 0,62 % por la franca lingvo.

La atmosfero estas favora.

Jen la konkludo de samideano E. C., la verkinto de l'artikolo, kiu aldonas ekkrie: « Nun aŭ neniam ni prenu nian ŝancon! » Reprenu ni lian alvokon por ke ĝi mileĉe resonu tra nia tuta lando, tra la tuta mondo. Sed dume ni ne forgesu pristudi kion povas enteni tiu ŝanco.

Eblaj sekvoj de la sukceso.

La gravega signifo de la decido fare de la B.N.R.O.: ekpropagandi Esperanton pere de la tutlanda sendstacio meritas certe esti akcentata. Ĝi metas tamen tutan devaron sur la nederlandlingvaj esperantistoj. La spertoj rilate al la pionira klopodo pensigu nin ĝustatempe pri la eblaj sekvoj de la novaj eksperimentoj.

Ĉu ni estas pretaj ?

Ĉiusemajne, preskaŭ ĉiutage la esperanto-kronikisto de B.N.R.O. Kortrijk estis devigita korespondadi kun interesiĝintoj kaj tiutempe li ne povis fari ion alian ol doni al tiuj personoj la adresojn de la esperanto-institutoj, de la gvidantoj de korespondaj kursoj k. s. Sed tiam tiuj instancoj ankoraŭ ne estis ekipitaj por daŭre kontentigi la interesiĝon de la novuloj kaj de la novajvidaj veteranoj. Ĉu nun ili estas pli bone ekipitaj? Ĉu nun ili disponas pri kompetenta stabo de kunlaborantoj?

Lokajn grupojn ni bezonas.

Tiuj instancoj ja ne povas anstataŭi lokajn grupojn. Ni devas kalkuli je reviviĝo de l'interesiĝo ĉe antaŭmilitaj esperantistoj, kun plialtigo de l'interesiĝo ĉe lamaj komencantoj kaj simpatiantoj, kun alfluo de lernantoj kaj grupigemuloj, kun serĉado de kursgvidantoj kaj de lingve kapabluloj. Oni volos legi librojn, revuojn; oni volos sin ekzercadi pri konversacio, deklamado, parolado. Nur loka grupo povas kontentigi tiajn bezonojn.

Ni bezonas verkistojn, paroladistojn, tradukistojn, propagandistojn kaj aktorojn.

Estas eble ke laŭ la maniero de la Praha, la « verda » stacio, la Belga Radio serĉos poste tradukistojn, paroladistojn kaj aktorojn por regulaj elsendoj destinitaj al la eksterlandaj esperantistoj. Io tia devas esti serioze organizita. Ĉi tie bonega ekipo de verkistoj devas esti pretigita; an la eksterlando niaj amikoj, en spirito de kunlaboro, kontraŭ reciproka niaflanka servemo, devos ekkapti la okazon por pruvi ke propagandado pere de esperanto profitigas, do pervaloras. Sed tie ni kontaktiĝas kun iom kompleksa kroma malfacilaĵo.

Kroma propagandado.

La propagandado pri la iniciato de la B.N.R.O. ni ne povas lasi al la sola stacio, memkompreneble ne, kiom ajn potenca ilo propaganda ĝi estu. Plej urĝe ni bezonas propagandistojn por sukcesigi per kroma propagando la klopodojn de nia nacia radio-organo. Nun aŭ neniam ili devas ekuzigi ĉiujn disponeblajn propagandrimedojn por atentigi niajn samnacionojn kaj samlingvanojn pri Esperanto kaj ties multflankaj profitoj kaj benoj. Sed tial ke niaj propagandrimedoj, mono ekzemple, estas ekstrema limigitaj — mezuritaj laŭ la skalo de l'rimedoj je la dispozo de aliaj reform-ideoj — ni estas devigitaj kun la plejble granda zorgo alvokadi sur kiu rimedo aŭ kiuj rimedoj ni kontrigu niajn fortojn, ank' ili limigitajn!

Propagando en la ĵurnaloj.

Kaj tiam speras al ni, kiu la plej konsiderinda rimedo, la propagandado en la ĵurnaloj; ĉar ĵurnaloj estas ankoraŭ ĉiam la plej taŭgaj iloj por kaptantumi la publikan opinion. Sed pri niaj rilatoj kun la gazetaro la ŝajnas ne esti en ordo.

Tiam ke aliaj naciaj kaj internaciaj movadoj multe regule paroligas pri si la ĵurnalojn, nia movado preskaŭ neniam estas menciita. Ĉu tio estas maldankinda al la fakto ke niaj propagandistoj neelas kiel kontaktiĝi kaj resti en kontakto kun la presoficejoj kaj aliaj presinstancoj, kaj gazetportistoj, lokaj korespondantoj ktp. ? Ĉu ni suferas pro kompleksa de tro malalta memtakado?

Fakuloj serĉataj.

Kiu ajn estu la kaŭzo de l'fenomeno, mi demandas tamen al ni ĉu la samideano-ĵurnalistoj ne farus grandan servon al la movado, verkante serion da artikoloj, poste libroforme re-eldonota, pri la plej bona metodo fariĝi ĵurnalistoj. Mi opinias firme ke fulmo-kurso, iniciatante pri la plej urĝe bezonataj mediaj sekretoj forigus ĝenan mankon ĉe multaj bonvolaj sed malspertaj, malsufiĉe ekipitaj samideanoj.

Alia aspekto de l'problemo.

Malmultaj estas la agemaj kompetentuloj en nia movado post la terura periodo de l' milito kaj de l' antaŭmilitaj kontraŭagado kaj persekuto en pluraj eŭropaj landoj. Tial ĉi tiuj kompetentuloj estas superŝutitaj per ĉiuspecaj laboretoj, kiuj malebligas al ili komenci multamplajn, tempoprenantajn laborojn, kia la konstruado kaj elverkado de, ekzemple, 52-ĉapitra serio de propagandaj artikoloj kiujn povus enpresigi la semajnaj gazetoj. Komenci tian laboron sen plano, sen sufiĉa preparo kondukas al elreviĝoj kaj malsukcesoj. Krome, la redaktistoj pli volonte akceptas prespretajn manuskriptojn ol nur duone pretigitajn.

Multflanka aspekto : la kontraŭuloj.

Ni devas kalkuli je ĉiufankaj atakoj de ĉiuspecaj kontraŭuloj. Ĉu ni estas pretaj ankaŭ por tio? Antaŭ ĉio ni neniam forgesu ke ni estas armeo de « pacaj batalantoj ». La venko, kiun ni alcelas ne estas ekstermilita finvenko. Estas sufiĉe facile primoki kaj ĉagreni malamikojn. Sed tia agmaniero tute ne utilas al nia movado. Nia taktiko estu kompreni al kontraŭstarantc' kaj malsimpatiantoj ke adheri al la idealoj kaj celoj de la esperanto-movado ne signifas esti venkita, sed kontraŭe fariĝi kunvenkonto en unu el la plej belaj kaj noblaj bataloj, kiujn iam ajn batalis la homaro.

Fina aspekto : Kien iros la samkredanaj novuloj ?

Nian katolikan unuigon ni devas ĉiumaniere plibeligi, plifortigi, pliallogigi, por ke la novaj, katolikaj samideanoj amase venos pleniĝi niajn maldensigitajn vicojn. Sed al tiu problemo ni esperos dediĉi nian verdmonatan propagandan numeron. Kiom da ili ni povos sendi al vi? 2? 20? 200?

Antverpeno.

Ni eksciis post kiam la juna numero de FK jam estis survoje al niaj legantoj ke la familio de nia estrarano, K. Hartmann funebnas pro la morto de la patro, S-ro Charles Hartmann. Ni prezentas ĉiunome niajn sincerajn bedaŭresprimojn.

Tometon pli poste ni informiĝis pri feliĉa naskiĝo de filineto Maria en la sama familio. Al S-ro kaj S-ino Hartmann korajn gratulojn.

Bruselo.

La 20an de julio edziĝis en Bruselo S-ro Pierre Notaerts, fukeano. Sekvante la ekzemplon de nia prezidanto en lia plej lasta rondira letero, ni sendas niajn korajn bondezirojn al la juna paro.

Recenzoj

DANGERA FIVERKO: H. L. Egerrup: Dro Dorner. Aabyhoj, Dansk Esperanto Forlag, 1945, 209 p.

El la vidpunkto de la Ĝenerala Moraljuro kaj de la Katolika Moralo la verko de H. L. E. estas malbona libro.

En tre alloga, preskaŭ romantika maniero, kun dangera propagandefiko, la aŭtoro defendas, kiel tre naturajn kaj legitimajn tezojn, la plej abomenindajn praktikojn. La verkinto pardonas al ni, se ni diras ke la libro memorigas nin pri la plej hontinda nazisocialista literaturo. La libro estas ne nur malmorala, ĝi estas preskaŭ sendia kaj certaj esprimoj insultas la honoron de Dio. Se la aŭtoro estas kredanto, li ja apartenas al la plej ekstrema liberala skolo, por kiu Dio estas la nobla ekzultulo, forpelita el la homa socio. Praktike lia libro estas materialisma-atelisma verko. Liaj praktikaj vivprincipoj ŝajnas esti: 1° ĝui kaj fari ĝuoplenajn homojn; 2° la celo pravigas la rimedojn.

Estas nobla celo plibonigi la homan rason; ankaŭ ni alcelas tiun idealon. Sed ni konceptas ĝin alia ol H. L. E. La korpa valoro de la homo estas laŭ ni, nek la sola, nek la plej alta homa valoro. La celo de la korpa valoro certe estas posedi pli belan materian vivoforton, sed ankaŭ kaj precipe: doni al la specife homaj valoroj, nome la spiritaĵoj kaj moralaj fortoj, pli lertan kunlaboranton. Ni ne volas plibonigi la homrason sur la sama bazo kiel ĉeval- aŭ bovrason.

La besto estas nur servodevo; la homo, pro sia spirita strukturo, estas digneco. La libro de H. L. E. estas atenco kontraŭ la homo. Ni ne povas konsenti kun liaj konceptoj ja tro brutaj pri la arta gravedigo, en kiuj la rajtoj de la edzo estas rezignataj kaj la junaj virinoj liverataj al premilita seksperforto.

Lia idealo de mondopaco, realigota per internacia arta prostituado kaj adulto estas absurdaĵo. Kiel paco povus esti en socio naskita el la senhonorigo de la morala homo? Tiu socio estos hordo da bestoj, pelataj de tirano aŭ reciproke sin formangegantaj.

Malnobligi la generopvon de homo ĝis nura erotikado, sen aliaj leĝoj ol la leĝo de la plezuro, tio estas instrui degeneron tiom korpan kiom moralan.

Lia militarisma entuziasmo por bredi soldatojn en sia homkulturejo ŝajnas al ni malbone akordiĝi kun sia klopodo por realigi internacian pacon! Olivbranĉo kaj pafilo kreskas en la sama arbaro de tlu laŭdira savonta doktrino! En la homo H. L. E. ankoraŭ nenion allan malkovris ol la beston. Ni bedaŭras tiun prokrastiĝon.

Kiel homo ni juĝas la libron maldigna; kiel katoliko ni opinias ĝin maskite obscena.

(Recenzo, flandralingve verkita de kanonika moŝto V. Heylen, laŭ peto de la tradukinto J. De Mayer, Colleege, Nijvel.)

H. C. Magel: Kie loĝas Esperantistoj en Nederlando?

Samideano H. C. Magel, Voorbeek 6, Aaist-Waalre (Nederlando) sendis al ni belaspektan, verdkoloran geografian karton de Nederlando, sur kiu li verdstele markis la urbojn kaj vilaĝojn en kiuj loĝas esperantistoj. Ŝajnas al ni ke la propagandan valoron de tia karto por ekspoziciaj celoj oni certe ne povas pridubi, sed respondo al la demando, kiuj loĝas en la verdstelimitaj lokoj, kaj kiom da ili, ĝi ne donas. Pro tio la elpensajo de nia samideano havas nur limigitan valoron. Eble li povos surprizi nin per aldono de broŝureto kiu plenumu la mankon? Adresaro de nederlandaj gesamideanoj? La dimensioj de la karto estas 36 x 43 centimetroj. Prezo: 0,75 ned. guld. aŭ 6 Rkj.

Heroldo de Esperanto.

Al sinjoro Theo Jung dankon ni ŝuldas, tial ke li sentas en si la fortojn por fosi sulkegon kaj ne hezitas entrepreni tian fosadon. Reaperis kiel « sendependa, internacia organo de la Esperanto-Movado » « Heroldo de Esperanto ». La tri jam aperintaj numeroj aspektas multpromesaj: belaj atestoj pri la entuziasmo, idealismo kaj kompetenteco de la redaktoro. Oni bedaŭras, legante tian gazeton, ke ankoraŭ tiom malmulte da samtempuloj komprenas la valoron kaj senlimajn uzeblecojn de nia lingvo, eĉ nur sur la kampo de l'jurnalisma agado. Tial ni esperas ke « Heroldo de Esperanto » kun ĉiam kreskanta sukceso povu plenumi la taskon, esprimitan en ĝia nomo: « heroldo » Esperanton.

Sed... kion pensi pri la « neŭtraleco » de tia gazeto? Strangajn konsekvencojn necesigas ĝi. Mi supozas ja, kun ne tro granda erareblo, ke la plimulto de la abonantaro konsistas el personoj de kristana deveno, ke ili estas pra-idoj de la kristanoj kiuj dum la krucmilitoj riskis siajn vivojn por malebligi ke la mahometanismo konkeru Eŭropon. Sed nun mi vidas ke en la tria numero « eŭropa islamano » propagandas sian mondokoncepton. Indirekte do kristanaj abonantoj financas islaman propagandon. Ĉu tio ne identas al troigado de la neŭtraleco?

Laŭ mia konvinko tia neŭtraleco havas la samajn rezultojn en la religia mondo, kiajn havis la neŭtraleco en la politika mondo rilate al la faŝistaj kaj nazisocialistaj doktrinoj. Ĝi estas neŭtraleco pro kiu ni meritas punon; ĝi estas fakte malkuraĝeco, apostatiĝo, « pilatismo ».

Individuan abonon pro tio ni malkonsilas; grupaj bibliotekoj eble povas aboni kaj rondirigi la gazeton post kiam la religiaj konsilantoj donis siajn aprobojn.

Strukturo Esperanto-organizado

Het eerste gedeelte van dit belangwekkend artikel van H. G. Wannemakers S. J. drukten wij af in FK Nr. 6 va Juni 1946 blz. 2 en 3; het handjele over het vooroorlogsche organisatie-leven. Zie hier het vervolg.

2. Een grondslag voor de heropbouw van de plaatselijke afdeling.

Hoe hebben wij nu de heropbouw van de plaatselijke afdeling te denken aan de hand van de de voorafgaande ervaring?

Een vergelijking moge dit duidelijk maken. In de natuur vinden wij, dat een levend wezen naarmate het volmaakter is, wordt gekenmerkt door een grootere getal en een grootere verscheidenheid van organen, waarin een aantal cellen samenwerken tot een bepaald doel, ten dienste van het gehele wezen.

Wat bij de levende wezens het geval is, vinden wij ook in het gemeenschapsleven van den mensch; de eenvoudige vereeniging kent geen andere werkverdeling dan die welke eigen is aan de bestuursleiden, de hoogste louter menselijke gemeenschap daarentegen, de staat, bezit in haar volmaaktheid een zeer groot aantal organen van zeer uiteenlopend karakter.

In de vooroorlogsche periode van de Esperanto-Beweging was de werkzaamheid van de Beweging vooral gericht op de stichting van nieuwe afdelingen en het winnen van een zoo groot mogelijk aantal leden. Nu het bestaan van die afdelingen welke gesteld is en de wegen voor de uitbreiding van het lidental naar vele kanten openliggen, is de achter behoefte aan organisatie in de afdelingen om de grootere verscheidenheid van werk aan te kunnen door een geschiktere werkverdeling en samenwerking.

Behalve de afdeling als geheel en de afzonderlijke leden zijn daarom organen noodig, bestemd voor een afzonderlijke en nauwkeurig omschreven werkzaamheid. Zij worden gevormd uit personen die door eenzelfde belangstelling, maatschappelijke positie, relaties of inzichten tot een meer diepgaande samenwerking in staat zijn en voor het bijzondere doel van de groep bijzondere geschiktheid bezitten tot welken van de geheele Beweging.

Wij zullen in het vervolg deze organen GROEPEN noemen; zij zijn de levende deelen, waaruit de afdeling is opgebouwd en waarin een groot deel van het gemeenschapsleven zich afspeelt.

Enkele namen kunnen als inleiding dienen: zoo kunnen groepen voorkomen voor studie — conversatie — zakenleven — toerisme — taalstudie — literatuur — schrijven — onderwijs — universitaire actie — propaganda — apostolaat voor I.K.I. — misieactie — Mariacongregatie — verkennery — briefwisseling — bibliotheek en boekhandel — tooneel — voordracht — blindenwerk.

Bij ieder van deze titels kan een korte toelichting nuttig zijn om het bijzondere doel wat nauwkeuriger aan te geven.

De kadergroep

deze heeft als doel vragen van algemeene aard omtrent studie van Esperanto, organisatie en invoering van Esperanto te bestudeeren en tevens het werk te verrichten, waarvoor geen afzonderlijke groepen bestaan. In Nijmegen bestaat sinds eenige tijd reeds zoo'n kadergroep, die in de afgelopen maanden verschillende onderwerpen en acties in studie nam; en dit voorstel is daarvan een der vruchten. Daarnaast bestaan bijzondere groepen; zooals:

De conversatiegroep,

waarvan de naam reeds het doel aangeeft. Ook hiervan bestaat in Nijmegen een voorbeeld, waar een groep van ongeveer vijf personen al enkele jaren regelmatig bijeenkomt om al sprekend hun kennis en vaardigheid te vergrooten.

De zakengroep

omvat enkele menschen uit het zakenleven, die op hun terrein Esperanto practisch gaan toepassen.

De groep voor toerisme

verzamelt toeristische gegevens in Esperanto en bereidt uitgaven in Esperanto voor over het toeristische leven in onze streken door contact met de Vereeniging voor Vreemdelingenverkeer, bestudeering van heemkunde, verspreidt toeristisch materiaal in Esperanto in het buitenland.

De groep voor taalstudie

eventueel verbonden met die der literatuur en voor schrijven maakt taalkundige studies, bestudeert werken over linguïstiek en schrijft zelf artikelen voor Esperanto-tijdschriften en voor Nederlandse tijdschriften en kranten.

De universitaire groep

heeft als leden universiteitsprofessoren en/of studenten, zij wekt in die kringen belangstelling voor Esperanto. Zij zoekt naar toepassing van Esperanto: bijv. als taal voor proefschriften, voor samenvattingen aan het einde van proefschriften. Verder zorgt zij voor de publicatie van wetenschappelijke artikelen in Esperanto of in 2 talen en de verzorging van samenvattingen in Esperanto aan het slot van wetenschappelijke bijdragen. Ook bevordert zij de keuze van Esperanto als taal of van wereldtaalproblemen als onderwerp voor proefschriften en wetenschappelijke artikelen.

Behalve deze groepen zijn ook andere mogelijk,

b.v. een groep van doktoren, advokaten, journalisten, priesters, enz., die ieder op hun gebied Esperanto bevorderen en toepassen. Verschillende groepen kunnen ook onderling verbonden voorkomen. Ook is het niet noodzakelijk dat alle in iedere plaatselijke afdeling voorkomen. Veel zal afhangen van de grootte en de aard van de plaatselijke afdeling en de plaatselijke omstandigheden.

3. De vernieuwde structuur van de plaatselijke afdeling.

De oprichting van groepen, die zoo intensief het werk van de afdeling organiseeren, vraagt een regeling van de verhouding vanuit organisatorisch oogpunt. Hoe is hun verhouding tot de afdeling en hoe tot de leden?

De plaatselijke afdeling heeft aan het hoofd een dagelijks bestuur, bestaande uit drie personen, voorzitter, secretaris en penningmeester. Dit dagelijks bestuur komt zoo dikwijls bijeen als wenschelijk is voor de goede gang van zaken.

De leden van de afdeling zijn ofwel *afzonderlijke* leden ofwel *groepsleden*. De afzonderlijke leden zijn alleen lid van de plaatselijke afdeling, de groepsleden zijn bovendien lid van een groep. Verder bestaat de afdeling uit een of meer groepen, iedere groep vormt zichzelf en zorgt zelf voor aanvulling van leden. Zij kiest een *groepsleider* uit haar leden. Wie wil lid worden van de groep heeft zich tot den groepsleider te wenden, die de voordracht doet aan de leden van de groep, ook niet-Esperantisten. De *groepsleider* behoort echter altijd lid van de plaatselijke afdeling te zijn. Het is mogelijk tegelijkertijd lid te zijn van meer dan een groep. De groep komt regelmatig bijeen overeenkomstig den aard der werkzaamheden. Zij is

voor het interne werk onafhankelijk. Voor het werk naar buiten, behoeft zij via den groepsleider contact met het bestuur van de afdeling, het z.g. *groot bestuur*. Dit komt ongeveer driemaandelijks bijeen om de algemeene richtlijnen vast te stellen.

Het dagelijks bestuur heeft een dubbele taak: 1. de verbinding te vormen met de landelijke bond, 2. contact te houden en samen te werken met de groepsleiders. Eventueel samen te werken met andere plaatselijke Esperanto-vereeningen.

Het dagelijks bestuur van de plaatselijke afdeling wordt gekozen door de groepsleiders en niet door de leden, doch wel uit de leden. Ieder lid van de plaatselijke afdeling, zoowel afzonderlijk lid als groepslid komt dus rechtens voor de bestuursfuncties in aanmerking. Leden van het dagelijks bestuur kunnen ook groepsleiders zijn. De afdeling als geheel komt bijeen voor feestelijke bijeenkomsten, tooneelvoeringen, films, lezingen in Esperanto, congressen, enz. doch niet om te vergaderen.

Het aantal leden van een groep kan zeer wisselend zijn al naar den aard van de groep. Een bibliotheekgroep en een groep voor taalstudie zullen als regel slechts enkele leden tellen, terwijl voor een tooneelgroep een grooter aantal gewenscht is.

De ledenlijsten van de groepen komen via den groepsleider bij den afdelingssecretaris, de geldelijke bijdragen op dezelfde wijze bij den penningmeester. De groepen kunnen een afzonderlijke groepscontributie heffen naar onderling overleg. De groepen houden contact met overeenkomstige groepen in omliggende plaatsen om door uitwisseling van ervaring en door gemeenschappelijk werk ook elkander te steunen. Bepaalde groepen kunnen ook landelijk samenwerken. De groepsleider is hiervoor de aangewezen persoon.

KIA UNUECO DONAS FORTECON ?

Deziresprimo pri unueco.

Ni ricevis sekvantan komunikon de « Flandra Ligo Esperantista » kiun ni volonte publikigas, tial ke ĝi havigas al ni taŭgan okazon priparoli iom detale kelkajn aspektojn de la problemo sugestiita en la titolo de ĉi tiu artikolo. La komuniko tekstas jene :

La XI a Kongreso de « Flandra Ligo Esperantista » en sia ĝenerala kunveno de la 9-a de junio 1946a.

1° esprimas la deziron ke la neŭtralaj internaciaj Esperanto-Asocioj senprokraste kaj en reciproka toleremo pristudu eventualan reunuiĝon de la neŭtrala internacia Esperanto-Movado ;

2° esprimas la esperon ke tiu de ĉiuj sopirata unueco efektiviĝos plej laste okaze de la unua postmilita Universala Kongreso ;

3° instigas ĉiujn internaciajn Esperanto-Asociojn, neŭtralajn aŭ neneŭtralajn, pristudi senprokraste la starigon de tutmonda Esperanto-instituto kiu reprezentus ĉiujn esperantistojn senescepte ;

4° decidis komuniki tiujn deziresprimojn al la Esperanto-gazetaro por ke ili veku ĝeneralan

atenton kaj simpatian ;

kaj pritraktis plu tagordon.

Tion lastan ni ja ne faros. Kontraŭe, ni pritraktos la enhavon de ĉi tiuj deziresprimoj. Ni dediĉos al ĝi enkondukan konsideradon kaj kelkajn marginajn notojn.

Ĉu unueco donas fortecon ?

Estas karakteriza trajto de nia epoko atendi finsavon el ĉiuj malfacilaĵoj kaj katastrofoj per *unueco*, kvankam eĉ Dio mem rompas mistere la *Unuecon* de Sia Esenco per la *Triobleco* de siaj Personoj, kaj evidentiĝas el la rezultoj de la moderna fiziko ke pli da energio liberiĝas per la frakasado de atomoj ol per ilia tuteca konservado.

Ĉu ne en tiuj faktoj kaj fenomenoj enfermita estas por ni instruo ?

Ni ekzamenos tion en sekvonta numero de F.K. (Daŭrigota.)